2-a Jaro. N-o 51 (101) APERAS  SEMAJNE 2. Septembro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII^e | Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX^e | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

La Meksikia Registaro kaj la Roma Pastraro

Ega bruado plenigas la mondon pri supoza persekutado al la katolika pastraro en Meksikio.

La vero estas tute alia. La pastroj el ĉiuj religioj estas pretendantaj ĉiam, estri ne nur la spiritajn aferojn, sed precipe la materialajn. En la okazo meksikia, ne necesas ripeti, kiamaniere la hispanaj konkirintoj « katolikigis » la Hindajn idolulojn. Tra la tuta tricentjara koloniiga registaro, oni uzis malliberejojn, turmentojn, kaj fajron por konverti la meksikianojn al kristanismo.

Tamen, inter la pastraro, same kiel en ĉiu granda kolektivo, ekzistas malsimilaj kategorioj, morale aŭ materiale; estas malsategitaj subuloj, laborantaj sincere dum aliaj havas la tutpovon kaj la tutĝuon.

Ĉe la komenco de la porsendependa Revolucio, en 1810, kelkaj subaj pastroj meksikiaj iĝis ĉefoj. Hidalgo kaj Morelos, la du plej grandaj figuroj en la meksikia revolucio, Matamoros, kaj ĉiuj vilaĝaj pastroj, mortis per pafado, post ekskomuniko flanke de la altaj episkopoj, kiuj, nature, apogis la hispanan registaron. Nur 115 jarojn poste, t. e. en 1925 pro la agitado de la liberaluloj, tia ekskomuniko estis nuligata.

Dum nia unua sendependa centjaro, la romuloj agadis aktive, sufiĉe sukcese, helpate de la popola malklereco kaj pro la malebleco de la registaroj ilin kontraŭstari kaŭze de konstantaj revolucioj. Laŭ la Konstitucia Akto 1857-a, la ŝtato estas disigita je la eklezio. Tio kaŭzis dekjaran bataladon, finitan



PREZIDANTO CALLES
SALUTAS LA LABORISTAN MANIFESTADON

per pafado de Maksimiliano de Aŭstrio en Kueretaro. La meksikia reakcio estis invitinta lin por iĝi reĝo; sed Meksikio jam en 1824 senkapigis alian katolikan reĝon, Aŭgustinon I (Iturbide); tiel oni bone pruvis, ke kronitajn kapojn oni ne akceptas tie ĉi, kaj ke la blusangaj tiranoj nepre falos sub la hinda pafado spite la apogo de eksterlandaj armeoj. (Aŭstra kaj franca en 1862).

En 1910, post tridekjara dormado, revekiĝis la Revolucio, ĉifoje kontraŭ la ekspluatistoj, la terrabintoj, kaj kontraŭ la registaro kiu mokis la leĝojn. Triumfinte, la movado en 1917 starigis novan Konstitucian Akton. Ĝi diras, ke la unuagrada instruado estos nepre laika, ke la pastroj de kia ajn religio devas esti naske meksikianaj, ke ili ne povos partopreni en la politiko ktp.

La tutmonda reakcio estas ĉiam forte reprezentata en Meksikio, kaj la registaro devis elpeli en kelkaj okazoj, reprezentantojn de Hispanio, de Anglio kaj de la Papo, pruvinte, ke ili kontraŭbataladis la meksikiajn instituciojn.

Dum naŭ jaroj, la katolika pastraro klopodegis nuligi la al ili koncernantajn konstituciajn artikolojn, ankoraŭ ne rigore aplikataj pro manko de regularo.

En Marto 1925 komenciĝis skisma agitado por sendependigi la katolikan eklezion el Romo. Tiu ĉi skismo ne plene sukcesas ankoraŭ pro aktiva, energia defendo de la romuloj; sed ĝi tamen vivas. La reformistaj pastroj havas ĉefon nomitan « Patriarko Meksikia » ; la mesojn oni faras en hispana lingvo anstataŭ en la latina, komprenita de neniu ; tio ĉi similas sendube, la reformacian movadon en Anglio.

En Julio 1926 aperis la federacia regularo de la konstituciaj prireligiaj artikoloj. La movado de katolikaj politikistoj (Kavaliroj de Kolombo), la katolika episkoparo, kaj la fanatikularo, precipe ina, atingis tiam la egecon. La « Ligo Nacia por Religia Defendo », anoncis, ke je la lasta tago de julio okazos kvazaŭa striko; ke ili fermos la preĝejojn kaj la pastraro forlasos la diservon. Laŭleĝe ĉiu preĝejo en Meksikio estas nacia propraĵo, ankaŭ ĉio enfermita tie: ornamaĵo, ilaro, pentraĵoj ktp. La pastraro anoncis ankaŭ, ke la katolika ligo bojkotos la komercon, la amuzadon, la registaron, unuvorte, minacante haltigi la tutan vivon, kaj tiel kaŭzi gravegan ekonomian krizon, kaj, sekve, la falon de la liberala registaro.

La laboristaro subtenas la registaron

La meksikia laboristaro, pri kiu ni parolos alifoje, estas grandparte organizita, kaj dividita en tri grandaj sekcioj. La fervojistan aniĝas preskaŭ ĉiu fervojisto. La ruĝa estas formata de teksistoj, petrolistoj kaj kelkaj aliaj grupoj. La tria, nomata CROM (Konfederacio Regiona Laborista Meksikia), kies gvidanto estas Luis N. Morones, nune ministro de komerco, industrio kaj laboro, entenas pli ol unu milionon da laboristoj ĉiuspecaj, kaj la grupo subtenas decide la registaron; dum la aliaj du grupoj agas foje amike, sed ĝenerale sendepende kontraŭ la registaro, kaj kutime malamike kontraŭ CROM.

Kiam la romuloj avertis pri ekonomia bojkotado, la CROM decidis la nepran frakasigon de la intrigo.

La konservativuloj ĉiam esperas rekapti la povon. Ili estus pretaj venigi alian eŭropan princon. Sed la laborista movado malebligis tiel belan sonĝon. La registaro jam aranĝis la daŭran malfermon de la preĝejoj malgraŭ la protestoj de la kreduloj kaj de iliaj pastroj.

Facile imagebla estas la sensacio kaŭzita, kiam la tuta pastraro eksiĝis, la 3-an de julio, escepte malmultaj el ili, kiuj obeis la oficialan regularon.

La unuan de aŭgusto, centmilhoma parado montris al prezidanto Calles (Kajes), ke la vivaj fortoj subtenas lin en tiu ĉi riska horo. La liveradon de preĝejoj al laikaj komitatoj oni faras ĝenerale facile, kaj ĉio normaliĝas. La teatroj estas malfermitaj, ĉio funkcias kiel kutime, kaj nur kelkaj sinjoroj nigre vestitaj montras fanatikulan doloron.

La meksikiaj leĝoj ne kontraŭstaras la katolikan religion, sed la enmikson de kia ajn religiulo en la registaro. Sed pretendas la strikantoj, ke la pastraro ĝuu civitanajn rajtojn, ke ili havu bienojn kiel antaŭe, ke ili povu paradi tra la stratoj, ktp., sed la Konstitucio, jam de 69 jaroj, diras: NE.

Prezidanto Calles montras neordinaran decidon por plibonigi la vivon de la meksikia popolo. Li estas eksprofesoro. Kiam necesas, li parolas klare kaj agas energie. Oni povas bone diri pri li: « Gratu la Prezidanton kaj ekaperos la revoluciulo ». Li klopodegas moraligi la publikan administradon, en kiu kuŝas multe da malbono. La publiko ja akre kritikas pro la malhonestaĵoj, kiujn faras registaraj oficistoj.

Estas interese mencii, ke ĉefe kontraŭstaras al la pastraro Inĝeniero Adalberto Tejeda (Teĥeda), ministro por internaj aferoj, kiu estis instruata mem de pastroj en Belgio kaj aliaj eŭropaj landoj. Li parolas malmulte, sed agas energie.

La granda meksikia Prezidanto Benito Juarez (Ĥuareth), vipo al pastroj kaj fanatikuloj estis edukata de pastro. Al Ministro Tejeda lin direktis en liaj unuaj jaroj, lia onklo, pastro, bluokula, afabla maljunulo. Estas proverbo ofte uzata ĉe ni: « Por ke la kojno premu, ĝi devas esti el la sama ligno ». Vi, karaj legantoj, ja scias, ke Ernesto Renan studis teologion, tial li estis el la sama ligno. Vere, la proverboj estas saĝaj.

Nun la dilemo por la katolikaj pastroj estas tiu ĉi: Ĉu meksikia civitano aŭ papa subulo? Eble la skismuloj fortikiĝos; rilate la registaron, ni povas diri sen ia dubo: La Meksikia Revolucio triumfos.

JESUS AMAYA.



Kelkaj aldonaj notoj pri Meksikio

Lastatempe la industrio tre ege malvolviĝis. Laŭ oficialaj raportoj, la respubliko enhavas 112 sukerfarejojn, 142 fabrikojn, kie estas kotono prilaborata, 36, kie oni prilaboras lanon, 75 ŝumanufakturojn, 222 tabakmanufakturojn, 68 akvoelektroproduktejojn kaj sufiĉe multe da paperfabrikejoj, da fer- kaj ŝtalfandejoj, da sapofabrikejoj ktp...

La minejojn kaj petrolejojn posedas eksterlanda kapitalo, precipe la usona. Ekonomiistoj instruas, ke antaŭ kelkaj jaroj Meksikio ne havis propran burĝaron. Nuntempe tiu socia klaso rapide kreskas. Tiun fakton montras la senĉesa plinombriĝo de la anoj de komercaj ĉambroj. La interesoj de tiu burĝaro konfliktas kun la usona imperialismo.

S-ro Rafael Nieto, eks sub-sekretario por la financoj, diris antaŭ kelkaj monatoj: « Per ĉiuj rimedoj ni devas bataladi kontraŭ la usona kapitalo... Se ni ne sukcesos en tiu batalo nia respubliko perdos sian sendependecon. »

Prikonsiderante tiujn faktojn, oni emas sin demandi, ĉu la lukto kontraŭ la fremddevenaj pastroj ne radikas pli profunde en la ekonomio ol ne montras la raporto de K-do Amaja.

Por faciligi la konkurencon de la enlanda kapitalo kontraŭ la eksterlanda, prezidanto Calles petas oferojn al la proletaro. Per la helpo de Morones li jam sukcesis atingi, ke la membroj de C.R.O.M. akceptu malaltigon de sia salajro. Kiam la laboristaro ligas siajn interesojn kun la naciaj, ĝi ludas ĉiam rolon de trompito.

Red.



Unuecfronto de la burĝaro en Ĉeĥoslovakio

Stariĝis nova koalicio de ĉeĥaj, germanaj, slovakaj kaj madjaraj (hungarlingvaj) burĝoj. Dum la pritraktado de la leĝoj por altigo de kampaj limdepagoj kaj por 200-miliona donaco al la pastroj en formo de « kongruo » (1), la ĉeĥaj naciaj demokratoj, kiuj kriegante ĉiutage naciajn frazojn ŝajnigis sin tiele, kvazaŭ ili volus elpeli la tri milionojn da germanoj el la ĉeĥosl. « paradizo », ĵus unuiĝis, kiam oni traktadis pri atako kontraŭ la poŝo de la malriĉa popolo, kun la germanaj « Heil »-naciistoj. Por ke la plialtigo de l' kampaj limdepagoj efektive trovu plimulton en la parlamento, ili vendis sin al diablo kaj papo.

La plikariĝo, kiu per tiu enkonduko okazas, estas por la laboristoj terura. Ekzemple, 1 kg. da faruno plikariĝas je kĉ. 1.20, 1 kg. da viando je 3.50, 1 kg. da terpomoj je 10 heleroj, 1 kg. da butero je 2.10, 1 kg. da porko-graso je 3.60, 1 kg. da margarino je 1.20, 1 kg. da lardo je 3.60 ktp.

Tiuj depagoj devas produkti proksimume 900 milionojn, sed la registaro deklaris, ke tio ne sufiĉas; sekve devas esti ankoraŭ enkondukita la plialtigo de l' sukerimposto, kaj tio de 58 heleroj al 1.30 por 1 kg.; la plialtigo de l' alkoholimposto je 2.80 por 1 litro; je 22 % estas plialtigitaj la fervojtarifoj por la personoj kaj je 33 % por la pakaĵoj.

Sub la devizo pri subteno de konstruomovado preparis la burĝaj partioj leĝoprojekton pri plialtigo de loĝejluopagoj. De la 1-a januaro 1928 ĝis la 31-a decembro 1934 ni estos pagintaj la konstrukotizon laŭ proporcio kiu varios de 50 ĝis 350 % (2).

La leĝigo de l' kampaj limdepagoj de la « kongruo » kaj de la tuta vico da projektoj, direktitaj kontraŭ la laborista klaso, kaŭzis grandan ekscitiĝon inter la laboristaj amasoj. Precipe en la industriaj centroj manifestis la laboristoj kontraŭ tiuj mizerigaj projektoj. En Praha ĉirkaŭ 50.000 laboristoj el diversaj partioj surstrate manifestadis. Kelkhora striko ankaŭ okazis en Praha, Kladno, Brno k. a. urboj. Ĉie oni protestadis.

En Praha, la manifestanta laboristaro estis atakata de la policistaro, centoj da laboristoj estis vundbatitaj kaj eĉ pafitaj, multaj arestitaj kaj nun jam kondamnitaj al 6-8 monata enkarcerigo. Memmortigis sin en la malliberejo 24-jara laboristo, Jaroslav Ŝindelat.

Malgraŭ ĉiuj protestoj kaj manifestadoj de la laboristoj kaj de siaj reprezentantoj en la parlamento, estis la limdepagoj, la « kongruo » kaj la plialtigo de l' suker- kaj alkoholimpostoj aprobitaj. Mankis nur la subskribo de prezidanto Masaryk. Ekzistis sufiĉe da naivuloj, kiuj atendadis, ke li certe rifuzos subskribi leĝon, kiu pligrandigos la mizeron de la laborista popolo, leĝon, kiu promesas riĉan rabaĵon al la procentegistoj kaj plikarigistoj.

Dum la tempo, kiam centmiloj da proletaj familioj kun maltrankvilo konstatis la plikarigon de ĉio, okazis en Praha grandegaj sokolfestoj (3). La ĉeĥa burĝaro per tio sukcesis dum kelka tempo deturni la atenton de la laboristaj amasoj, endormigi ilian ribelemon kaj unu tagon post la lasta sokolkongresa tago la prezidanto subskribis la leĝon. Foriĝis la lasta iluzio kaj espero, ke paĉjo Masaryk ne kapablos subskribi la mizerigan leĝon.

Ankaŭ la pastran « kongruon » susbskribis Masaryk. Tiele efektivigis la ĉeĥa burĝaro kaj ĝiaj gvidistoj la disigon de la eklezio je la ŝtato, solene promesitan al la ĉeĥa popolo per la Washington'a — (elp. Uaŝington' a) deklaracio de la 18-a oktobro 1918!... Tiele la burĝa kaj etburĝa progresemularo ĉeĥoslovakia montris sian veran karakteron, kvar tagojn post la festo de la martiro Ĵan Hus...

El raporto de CARLO ZIRKEZ,
SAT-ANO 1574.

(1) t. e. aldonpago el la buĝeto por la eklezioj.

(2) Interesatoj bonvolu skribi al la verkinto. Ni ne sukcesis kompreni tute precize la cititajn nombrojn. Ni povis nur resume citi ĉi tiujn du lastajn. Kaj ni profitu la okazon por insiste atentigi la K-dojn pri neceseco verki klare, precipe kiam temas pri nombroj.

(3) Sokol = falko, nacia unuiĝo gimnastika en Ĉeĥosl.

EL LA VIVO KAJ SCIENCOJ

Spitsbergen, la lando de glacio. (4)

Spitsbergen (pintomontoj) estas unu el la plej grandaj insuloj de insularo *Svalbard* en la norda glacia maro. Ĝi estas eltrovita de holandaj maristoj, en la XV-a jarcento.

Tri kvarono de la areo estas kovrita per ĉiama glacio; nur ĉe la bordoj la glacio degelas pro la varmetaj fluoj en la maro. Kelkloke la montoj stariĝas vertikale kelkcent metrojn el la maro kaj formas ĉe la suproj strangajn pintojn, de kiuj la insulo ricevis sian nomon. Sur tiuj vertikalaj montmuregoj oni facile vidas la diversajn geologiajn tavolojn jam de la pratempoj. Iam estis tropika varmego ĉe Spitsbergen; tion pruvas la dikaj karbtavoloj kiuj nun en diversaj lokoj estas ekspluatataj. Krom norvegaj ankaŭ holanda, sveda kaj angla-amerika kompanioj elfosas karbon. La karbo estas bonkvalita kaj abundas je multmiliardoj da tunoj. Ĉiujare estas nun elfositaj ĉ. 400.000 tunoj.

Dum vintro cirkaŭ 2.000 homoj estas okupataj en la karbindustrio. Krom ili ankaŭ ekspedicioj de ĉasistoj travintras en izolitaj subteraj kavernoj. Ili kaptas blankajn ursojn kaj vulpojn por ilin senfeligi. Ĉirkaŭ tiuj kavernoj troviĝas multaj tomboj, kio pruvas, ke la morto kaptis multajn ĉasistojn.

La tero en la minejoj estas frostigita ĝis pli ol 300 metroj; pro tio akcidentoj en la minejoj estas maloftaj. En la karbtavolo estas trovitaj multaj ŝtonigitaj fosilioj de kreskaĵoj kaj bestoj, kiuj havas tre gravan sciencan signifon. Diversaj mineraloj estas trovitaj, sed ĝis nun ne ekspluatataj.

Lastaŭtune, ekspedicio entreprenis boradon en la teron kaj trovis ŝajne riĉajn oleofontojn.

De oktobro ĝis junio, la insularo estas izolata pro la mara glacio. Regas la t. n. monata arkta nokto, tre enua tempo por la enloĝantoj. Sed dum la 3-monata somero, la suno brilas tage kaj nokte, la senneĝaj ebenaĵoj verdiĝas; kelkloke eĉ aperas belega floraro.

Ĉe la norvega kompanio, kiu estas plej moderne organizita, la ministoj estas bone traktikaj; kaj sekve la laborkonfliktoj estas maloftaj. Dum somero la ministoj vojaĝas hejmen por ĝui libertempon.

102.

(4) Resumo de perradia parolado antaŭ ne longe farita de norvega profesoro Werenskjald.

★

El Sibirio.

Gosplan (Regna ĉefoficejo por plani mastrumon) projektas ricevi el ĉiuj orminejoj de Sibirio minimume 32.800 kilogramojn da oro dum la kuranta jaro. El ili 7.200 kilogramojn devas liveri la orminejoj de *Leno,* kiuj nun estas ekspluatataj de unu kapitalista kompanio (*Lena Goldfilds*).

En la jaro 1928 la minejoj en Sibirio kaj Ural devas liveri 45.600 kilogramojn da oro, t. e. 76,6 % de l' ĝismilita kvanto. Nun la regno ekspluatas nur 50,8 % de ĉiuj orminejoj la aliaj 49,2 procentoj estas de privataj entreprenoj. En la jaro 1928 la regno devas havi 63 % de ĉiuj minejoj kun 41.000 laboristoj. Oni planas plialtigi la salajrojn kaj maŝine laboradi.

Komercejoj de Irkutska gubernio (ĉirkaŭ lago Bajkal) planas eksporti dum la nuna jaro 1.200.000 sciurfelojn. La rikolto de cedronuksoj estas riĉa. Sed la sciuroj ne estas tiom multnombraj kiom oni atendis, ĉar sciuroj amase pereis kiam ili migris el la nordo al la sudo de l' gubernio. Unu plej bona felo de sciuro nun en Irkutsk kostas ĉirkaŭ unu rublon; printempa felo de sciuro kostas nur duonrublon.

MAKSIM KRJUKOV.

★

Ne mortigu birdojn kun ringoj.

Printempe de tiu ĉi jaro, ornotologia sekcio de societo por esplorado Siberion vaste aplikis metodon de ĉepieda ringado birdojn.

Ĉiu kaptinto aŭ mortiginto de ringhava birdo sciigu pri tio al *Moskva Sokoljniki Biostacio de junaj Naturalistoj, aŭ al Novosibirsk, Krajevoj muzeo.* Nia biologia stacio studas transflugadon de birdoj; nome per kiaj vojoj ili flugas aŭtune kaj printempe kaj kie ili pasigas la vintron ktp.

Ne mortigu ringitajn birdojn, ne tenu ilin en kaĝoj, sed liberigu ilin, anoncante laŭ montritaj adresoj pri loko, tempo, speco de birdo, numero de ringo, kiam estis kaptata, kiam liberigata. Skribu esperante.

A. PETROV.

Novosibirsk poŝtkesto n-ro 5, SAT n-ro 5210.



HIGIENA VIVO

Spertoj pri malsanoj (1)

En mia vojaĝo Sudamerikon mi atingis fine Valparaison. Tie mi serĉis kaj trovis laboron, kaj mi iris por manĝi en la vegetaran pensionon de Maria A. Baldovino (mia nuna edzino). Sed mia laboro estis en vendejo de manĝaĵoj kaj mi estis ankoraŭ nesperta en tiu fako. Krom tio mi havas egan apetiton Kompreneble mi manĝis tro ofte. Kaj ne forestis la sekvoj. En sept. 1918, mi devis resti en la domo dum tri semajnoj pro reŭmatisma doloro ĉe kruro. Mi kuracis ĝin per fastado kaj fruktomanĝado. En oktobro de la sama jaro mi kaj mia fianĉino elmigris Argentinion. Baldaŭ post nia alveno en Buenos Aires ekestis epidemio de influenco. La oficejo de publika sano tie estis sufiĉe prudenta. Ĝi ordonis la fermon de ĉiuj viandovendejojn.

Mi ankaŭ malsaniĝis dum tiu epidemio. La malbonaj manĝaĵoj, kiujn mi devis engluti dum la vojaĝo, kune kun la postsekvoj de mia neregula manĝetado en Valparaiso, estis kulpaj. Ne estas verŝajne, ke mi estis infektata. Ĉar nek mia fianĉino, nek nia 4-jara adoptita infano, nek iu el la familio amika, ĉe kiu ni loĝis unuatempe en Buenos Aires, malsaniĝis de influenco. Kaj mi malsaniĝis tre ne grave, ĉar mi manĝis jam kun zorgo pri la sano.

Pro senlaboreco mi devis iri al la kamparo en decembro 1918 por labori. Mi estis devigata min nutri per la manĝaĵo de mia estro, t. e. per blanka pano, malbona viando, iomete da ĝardenproduktoj, sed tro malmulte da ĉi lastaj. Kaŭze de tio mi ree malsaniĝis je influenco, alveninte al Buenos Aires en februaro 1919 (somertempo en la suda duonglobo). Dum ses semajnoj mi restis malsana. Tamen mi sola malsaniĝis : neniu kun kiu mi kontaktiĝis fariĝis malsana. Mi kuracis min mem per manĝado de fruktoj kaj verdaĵoj.

Ree mi restis senlabora. Kaj mi ne trovis alian laboron ol tiun sur fervojlinio, 378 kilometroj sude de la ĉerfurbo. En tiu kampara ĉirkaŭaĵo kaj loĝante en tendo sen mebloj kaj sen lampoj, en aŭtuna malvarma vetero (aprilo kaj majo), mi kompreneble ne povis ion fari krom labori, manĝi kaj dormi. La manĝaĵo estis itala : multe da makaronioj, blanka pano, viando, fazeoloj (mankis verdaĵoj, terpomoj estis maloftaj). Per tiu manĝado mi grasiĝis kaj ŝajne fartis bone, sed mi jam sciis, ke tiu grasaĵo ne estis bonkvalita. Kaj tiel okazis, ke veninte al la urbo, kie mi ree komencis manĝi la vegetaran manĝaĵon kaj elpurigi la grasaĵon el la korpo, mi ree malsaniĝis. Tiun ĉi fojon mi ne enlitiĝis krom nokte. Sed mi ne povis resti multe en la lito, ĉar nur dum la nokto mi estis malsana : estis reŭmatisma doloro en la brakoj tiel forta, ke estis neeble dormi. Komence mi leviĝis el la lito kaj trinkis multajn tasojn da mateo (sudamerika teo farita el la ileksaj folioj paragvajaj), kaj per tio pasis la doloroj, sed post kelkaj tagoj tiu rimedo malnoviĝis kaj ne plu efikis. Tiam mi provis alian, la gimnastikon. Mi eliris dumnokte por marŝi kelkajn horojn tre rapide. Kvankam tio por la momento kvietigis la dolorojn, ĝi ne forigis ilin, ĝis mi fine estis konsilata manĝi krudajn karotojn kaj krudan celerion. Per tiuj manĝaĵoj kaj multaj oranĝoj mi forigis tute la doloron en la brakoj. Post tio neniam plu mi havis reŭmatismajn dolorojn. (2)

Jam vi konas la metodojn, kiujn mi uzas, kaj mi povas pli rapide nombrigi la okazintaĵojn, por ne fari mian leteron tro longa.

Nia knabino malsaniĝis je morbilo vintre 1919. Kuracado per ŝvitbano, varma lito, sen manĝaĵo. Trinkaĵo : teo de tilio kaj citronsuko.

Mia edzino, kiu en Argentinio restis malforta kaj ne povis toleri la sunbrilon, ĉar la kapo doloris pro la varmo, sin kuracis en Svedio, manĝante mirtelojn kaj vakciniojn kaj povis poste en Usona varmega somero tute libere iri en sunbrilon.

La infanino estis inokulita per sero kontraŭvariola dufoje dum la vojaĝo de Svedio al Usono : en Göteborg kaj en Londono. Spite tio ŝi malsaniĝis je variolo en Usono (decembro 1922).

La sama knabino ankaŭ malsaniĝis en la vojaĝo de Londono al Sudameriko. Ŝi havis fortan febron kaj fariĝis preskaŭ nigra, kvazaŭ de ĥolero. Kuracisto estis alvokata de la loĝejmastro kontraŭ la volo de la patrino. Sed li ne havis tempon por alveni tuj, nur ses horojn poste. Tiam la knabino estis jam kuracita per citronsuko kaj tiliteo. La kuracisto demandis, kiel fariĝis, mia edzino rakontis al li, kion ŝi estis farinta. Li diris : tre bone farite.

K-do P. en Rockford havis edzinon malsanan je ulcero stomaka. La kuracistoj ankaŭ trovis komencantan kanceron kaj konsilis tujan operacion. Ŝi ne volis. Mi konsilis manĝadon de oranĝoj kaj nigra pano, kaj verdaĵoj, kiujn estis malpermesinta la kuracisto. Ŝi saniĝis.

Du filinoj de K-do K. malsaniĝis je tonsilito : la lerneja kuracisto ordonis operacion. La patrino ne rapidis pri tio, ĉar ŝi ne havis monon. Mia dekjara knabino konsilis al ili ne manĝi lakton kun blanka pano sed oranĝojn. Tiel la tonsiloj saniĝis en du tagoj.

La filo de K-do A. forte malsaniĝis pro stomaka trolaborado. Forta febro. La infano estis preskaŭ morta, kiam fine la dua kuracisto veninta sukcesis revivigi ĝin per varma bano (kiam la vivo estas en danĝero ili ne uzas siajn medikamentojn sed rimedon pli energian, la ŝvitbanon). Sed tiu sama kuracisto estis tiel malsaĝa, ke li malpermesis al la knabo manĝi fruktojn, kun la rezulto, ke li fariĝis tiel mallaksa, ke estis por li neeble feki. La patro donis al la knabo pomojn, eĉ iris kun li al la kuracisto, kun pomo en la mano. La doktoro diris, ke li manĝu pomojn, se tio estas necesa : kelkaj infanoj ne povas toleri la lakton, li diris.

De la 1-a de majo ĝis la 24-a de dec. 1924 mi manĝis nur krudajn manĝaĵojn : fruktojn, verdajn foliojn, legomojn, karotojn, melopepojn, eĉ terpomojn, kun iom da mielo, olivoleo, nuksojn kaj farunon. Mi trinkis tre malmulte da akvo, ĉar la fruktoj enhavas ja sufiĉe da ĝi. Mi fartis tre bone. Ĉiu postesigno de malvarmumemo, kataro, k. s. malaperis. Mi povis labori duoble pli multe ol dum kuirmanĝa dieto. Mi bezonis du semajnojn por alkutimiĝi al la kruda manĝaĵo, sed poste mi ŝatis ĝin eĉ pli. Mi forlasis ĝin pro praktika kaŭzo : mia edzino havas pensionon vegetaran kun manĝaĵo kuirita. Restas multe da bona manĝaĵo forĵetenda, se mi ne manĝas ĝin. Krom tio estis multe da laboro por ŝi prepari du specojn da manĝaĵo. Eĉ se mi mem konsentis prepari la mian, estis tro malvasta loko por tio en la kuirejo. Nun mi manĝas krudan manĝon en la mateno, kaj en la tagmezaj labortagoj, kiam mi kunportas manĝaĵon al la fabrikejo. Post tio mi malvarmumis multfoje dimanĉe, kiam mi manĝis multe da ameloriĉaj manĝaĵoj, sed resaniĝis lunde. Tio okazis jam tiom da fojoj, ke mi estas tute certa pri la kaŭzo de tiu malsaneto.

Bone, nun mi devas fini. Mi ne rakontis ĉiun observon, kiun mi faris, sed esperebIe sufiĉe multajn por ke vi vidu, ke mi ne parolas tute teorie, el libro ĉerpitajn frazojn, sed ke mi vere studis dum multaj jaroj la nutradan problemon, kaj mi daŭrigas la studadon.

Karl Fröding (Rockford).

(1) Vidu la n-ron 77 de S-ulo.

(2) Ĉu la resaniĝo okazis pro la speciala dieto aŭ pro tio simple ke la malsano atingis la finon de sia kutima evoluo ? La citita fakto ne estas pruvovalora. — *Red.*

Faktoj kaj Dokumentoj

Internaciismo-Sennaciismo.

Rilate fremdan politikon kaj nacian defendon, diris lastatempe civitano Paul Boncour (Pol Bonkur) « estas unue *la interesoj de* mia *lando, kiujn mi pretendas atenti, kaj se mi opinius, ke ekzistas kontraŭeco inter ili kaj la direktivoj de nia Internacio, mi ne ŝanceliĝas por diri, ke ĉi lastajn mi oferus al la unuaj ... »*

Kaj tio estas ja tre logika je internaciisma vidpunkto. Nur sennaciulo povus aliel paroli. Nur je sennaciisma vidpunkto oni povas malatenti la naciajn interesojn kaj esti preta subteni la forton, kiu estas pli kapabla ol ĉiu ajn alia plirapidigi la sennaciigan historian proceson.

Tia proceso povas kelkokaze kontraŭi ian nacian intereson, iun nacian sendependecon.

Sed civitano Pol Bonkur estas certe tre konsekvenca internaciisto kaj ne meritas la riproĉojn, kiujn sampartianoj liaj direktas al li.

★

Saman opinion havas S-ro Page (Peĝ) la prezidanto de la XVIII-a neŭtrala esperanta kongreso. En sia parolado li diris :

« La plej bona patrioto estas la plej bona internaciisto ... »

Estas vere, ke kelkaj « internaciistoj » havas alian komprenon pri internaciismo ; sed mankas al ili la ĝusta vorto por esprimi ilian ideon.

Estos la gloro de SAT, ke ĝi forlasis la konfuzan esprimon « internaciismo » kaj difinis la malprecizajn aspirojn de la proletaro per la vorto sennaciismo, *kiu havas tute precizan kaj nefuŝeblan sencon.*

Sennaciismo povas ja kontraŭi kelkokaze al la naciaj interesoj, ĉu kulturaj, ĉu lingvaj, ĉu aliaj ; ĝi atentas nur la liberiĝon de l' laborista klaso tutmonda.

SOLENA MALFERMA KUNSIDO

de la VI-a SAT-Kongreso en Palaco de Uricki

Iama « Taŭria Palaco », kie kunsidis la « Duma »

kaj, post la oktobra Revolucio, la I-a Kongreso de Komintern.



Maldekstre oni legas :

For la lingvobarojn ! Vivu Esperanto — la interkomprenigilo laborista.

Meze : SAT kontraŭbatalas naciismon, patriotismon, religion.

Dekstre : Gek-oj, veron pri Sovetio. Kontraŭstaru al la burĝaj mensogoj.

KONGRESAJ TAGOJ

El la Notlibro de Kongresano

Amasa alveno.

Kongresanoj alvenas. De ĉiuj flankoj. Kun ĉiu vagonaro. La novevenantaj klopodas en la akceptejo, registrante sin kaj atendante sciigojn pri loĝejo. La aliaj, pli frue venintaj, senĉese vizitas la akceptejon por informiĝi pri la nombro de alvenintoj.

La nombroj ĝojigas: aliĝis 684, alvenis 400, el ili 140 alilandanoj...

Sed jen la kvina horo. Aperas orkestro, la kongresanoj formas kolonon kun standardoj kaj afiŝoj. La kolono ekmarŝas al la palaco, en kiu devas okazi la solena malfermo.

Leningrad, kiu multon spertis, kiu multon vidis, unuafoje tamen povis observi tian demonstrantaron — longa kolono, nerapide marŝanta tra la ĉefstratoj de la urbo, konsistanta el homoj de plej diversaj landoj, ne dividiĝas en apartajn grupojn de samlandanoj, ne kunportas iujn signojn, kiuj indikus apartenon al tiu aŭ alia nacio aŭ lando. Male — diverslandanoj intermiksiĝis; super la kolono flirtas nur ruĝaj standardoj kun la verda stelo, nur ruĝaj afiŝoj kun blankliteraj devizoj; kaj sonas *unulingve* la batala kanto proleta « Internacio ».

La vojo estas longa — tuta horo de marŝado. Apartaj kolonanoj transiras el unu vico en la alian — ja la K-doj, venintaj kun anglia karavano eniĝis la kolonon ĵus el la vagonaro kaj, nature do, multaj deziras renkonti inter ili siajn amikojn, siajn korespondantojn, fine — simple informiĝi pri ilia vojaĝo.

Ĵus el vagonaro — ili tamen ne montras sian lacon. Ili vigle rakontas, kiel la karavano estis renkontita en Svedio, montras svedajn ĵurnalojn, detale priskribantajn la traveturon de la nekutimaj pilgrimantoj al ruĝa Sovetio.

K-do M. Starr kunprenis pakaĵeton da miniaturaj ministaj lampoj, kiuj estis vendataj en Anglio por helpi al la strikantaj karbministoj. Tuj oni rapidas aĉeti ilin. Inter la kongresanoj ne estus necese agiti pri helpo al la strikantoj — oni ne bezonas paroli pri solidareco inter la solidareca sennaciularo...

En palacon.

Sed jen la palaco estas atingita. En la antaŭ-palaca ĝardeneto nin renkontas ankoraŭ du orkestroj. Ĉe iliaj sonoj solene ni eniras la kunsidan salonon — rapide okupas siajn lokojn la kongresanoj — kaj la granda salono estas plena.

Pasas duonhoro, antaŭ ol malfermiĝas la soleno. Mi ĉirkaŭrigardas la blankkoloran halon, aspektantan tute parlamente. Sed ja ĝi havas sian parlamentan historion — ni estas en la fama palaco je la nomo de Urickij, antaŭe — « Taŭria (*) - palaco ». Tie ĉi kunsidis la « Regna Dumo » -- la kvazaŭparlamento de cara Rusio. Al tiu ĉi palaco fluis homaj amasoj en februaro 1917 por saluti renverson de l' carismo; en tiu ĉi palaco okazis la unutaga kunsido de la konstituanta kunveno. Pli ĝuste — ununokta. Nur unu nokton oni parlamentece parolis, ĉar ĉe la mateniĝo la maristoj, gardintaj la palacon kaj la halon, deklaris ke ili estas lacaj aŭskulti la babiladon, dum necesas praktika laboro por konstruado de laborista ŝtato.

Ankaŭ hodiaŭ multaj maristoj estas en la palaco — ĉe la ĥorejoj, inter la publiko, ili varmege aplaŭdas al la kongresanoj. Nun ili ne bezonas gardostari en la palaco — ĉu en laborista lando iu intencus atenci kontraŭ laborista kongreso?

Kaj en la sama palaco laboris la unua kongreso de Komunista Internacio. Jen de tiu ĉi tribuno, kiun hodiaŭ okupas unu post la alia diverslandaj SAT-anoj kaj reprezentantoj de Leningradaj laboristaj organizaĵoj, salutantaj la Kongreson, de tiu ĉi tribuno parolis Lenin...

La solena malfermo ordinare ĉiam estas simila al aliaj solenoj — salutoj, muziko, aplaŭdoj. Sed iuj novaj, freŝaj sonoj aŭdiĝas en la hodiaŭa malfermo. Jen estas legata la saluto de l' Sovetia Akademio de Sciencoj — ĉu tio ne estas freŝa sono dum esperantistaj kongresoj? Akademio de Sciencoj salutas proletajn esperantistojn, ilian kongreson...

Sed ĉu ni miru? Ne, tiu tago pli aŭ malpli frue devis alveni ĉar la lingvon kreas, la lingvon vivigas ne iu individuo, preparanta ĝin en retorto laŭ iaj, al elitoj (*) nur konataj receptoj, — la lingvon kreas kaj vivigas la amasoj ĝin uzantaj, ĝin praktikantaj.

Skeptikulo konfesas sian eraron.

Kaj ĉu ne estas freŝa sono la jena parolo de l' reprezentanto de sovetiaj prolet-verkistoj: — « *Mi faris en mia vivo grandan eraron kaj mi venis por konfesi al vi tiun ĉi eraron. La eraro mia estas jena: mi ne kredis la eblon de artefarita lingvo, mi rilatis al esperantistoj kiel al utopiuloj. Kaj en vi kaj via lingvo estas potenca vivanta fakto...* »

Kaj unu post la alia salute klinas sin antaŭ la fakto reprezentantoj de diversaj laboristaj organizaĵoj...

La Kongreso de SAT, de la peresperanta porproleta organizaĵo; kaj la praktikeco, la teknikserva porproleta karaktero de SAT metas sian stampon sur la malferman solenon.

K-do Cook (Kuk), sekretario de Brita Karbminista Sindikato, sin turnas al la Kongreso por pere de ĝi transdoni al sovetiaj laboristoj la dankon de strikantoj por la malavara helpo.

Saksiaj ruĝfrontanoj interŝanĝas standardon kun smolenskaj ruĝarmeanoj. Ili ambaŭ utiligis la Kongreson por renkontiĝi kaj per helpo de esperanto konkretigi sian proletan amikecon.

Tiamaniere, eĉ dum la Kongreso, la aparato de SAT estis praktike uzata.

La soleno finiĝis kaj la kongresanoj disiras por komenci morgaŭ la kongresan laboron.

Laborkunsidoj.

Ĝi komenciĝas per la raporto de Ekzekutiva Komitato. Per la voĉo iom tondrosimila prelegas ĝin K-do Lerchner. Abundas ciferoj, montrantaj la kreskon de l'Asocio. La matena kaj la vespera kunsidoj preskaŭ plene estas okupitaj de la raporto. Diskutoj. Aprobo al la Ekzekutivo. Komenciĝas raporto pri esperanto kaj internacia laborista korespondado. Tio jam estas io nova en la programo de SAT-kongresoj. Ordinare ni ja okupis nin dum la kongresoj ĉiujaraj nur per la internaj problemoj de nia Asocio.

Nunjare ni plivastigis la programon, pridiskutante la apartajn regionojn de esperanto-aplikado — laboristan korespondadon kaj radion. Tio ja ne kontraŭas la SAT-statuton; sed tio montras, ke ni fariĝis sufiĉe fortaj por diskuti ne nur niajn internajn problemojn, sed ankaŭ nian ligon kun la ekstera mondo proleta, en kiu nia Asocio aperas kiel faktoro de interligo, kun ĉiu jaro pli potenca. Kaj la raporto pri esperanto kaj laborista lernejo — kiun sekvis la plej vigla diskutado — kiamaniere ĝi trafis en la kongresan programon? Ja SAT ne okupas sin pri la problemoj de esperanto-instruado! Sed tiu raporto, tiuj diskutoj estis kvazaŭ respondo de nia Kongreso al la fakto, ke ĝia honora prezidanto estas la gvidanto de l' popolkleriga laboro en Sovetio. Li aŭdu la opinion de la Kongreso pri la eduka valoro de esperanto, aŭdu kion opinias laboristoj diverslandaj pri enkonduko de esperanto en laboristaj kultur-klerigaj organizaĵoj de la tuta mondo.

Ni manifestis dum la Kongreso la faktajn rezultojn de la praktika esperanto-aplikado. La prilerneja raporto evidentigis nian, de lingvo-praktikantoj, opinion, kion necesas fari por ke la rondo de la proletaj lingvo-aplikantoj plivastiĝu.

Post laboro, amuzo.

Vespere — kongresa teatraĵo, kongresa koncerto — se vi deziras. Ne ĝoju tamen, la neŭtraluloj, ke ni imitas la neŭtralajn kongresojn. Nia teatrovespero, koncertovespero estas tute nekonata al vi. Ĝi postulis neniun elspezon flanke de la organiza komitato, ĝi postulis neniun enirpagon ĉe la kongresanoj. Ne — hodiaŭ vespere ni estas gastoj de leningradaj presistoj. Ili akceptas nin en unu el la plej luksaj kluboj — tiu de la laboruloj de « Ruĝa Ĵurnalo ».

Ne — nian koncerton, nian teatrovesperon partoprenas nek aktoroj, nek kantistoj, nek muzikistoj profesiaj. Sed la partoprenantoj

(*) Ĉu Taŭria aŭ Taŭrida? Necesus interkonsenti. — *Red.*

(*) Eminentularoj — *Red.*

estas malgraŭ tio veraj artistoj — kvankam la plejparto de ilia tago pasas en laborejo.

Hodiaŭ al la Kongreso montras siajn atingojn en kultura laboro la laboristaj kluboj de Leningrado. Jen iu klubo sendis sian muzikrondeton — la kordan orkestron, kiu regalas nin per bela koncerto.

Klubo de teksistoj regalas nin per sia buŝgazeto, kies unua numero — SAT-marŝo — estas plenumata en esperanto.

Kaj jen kant-ĥoro, en kiu kiel solistoj partoprenas tramlaboristo, seruristo, teksistino.

La kongresanoj sentis, ke sur la kluba scenejo estas fratoj laŭ la labor-stablo. Kaj la artistoj de sur la scenejo sentis siajn laborfratojn en la spektantaro (*).

Kaj ĉiuj ni sentis, kiom altaj jam estas la kultur-atingoj de la laboristaro en Sovetio, malgraŭ ke ĝi la plejparton de sia energio devis direkti al alia laboro — ĉu industria konstruado, ĉu ĉefronta batalado.

Sed mi preferas, ke pri tiu vespero rakontu siajn impresojn nesovetiaj K-doj kaj rakontu ne nur sur la paĝoj de Sennaciulo, sed ĉefe dum la laboristaj kunvenoj de sia laborejo, de sia loĝurbo, loĝloko.

Kongresanoj delogataj.

Dimanĉo, la 8-an de aŭgusto, laŭ la kongresa programo devis esti dediĉata al ekskursoj. Sed antaŭtage la Kongreso decidis ankaŭ tiun tagon dediĉi al laborkunsido.

Sed kio do estas pli forta — ĉu la laciĝo de l' kongresanoj, ĉu ilia intereso al la vivo de l' laboristaro en Sovetio ? La fakto restas fakto : la granda plimulto de la kongresanoj spite sia antaŭtaga decido forveturis el la urbo ; presistoj kaj ĵurnalistoj partoprenas speciale por ili organizitan festenon en la presistaj ripozdomoj en Peterhof, la aliaj — partoprenas eksterurban ekskurson de leningradaj ŝpinistoj.

Kaj la kunsida salono ne estas plena. Ĉu ni bedaŭru ? Mankas tempo por bedaŭri. Ni rilatas kiel al fakto tute natura : la Kongreso dividiĝis je du sekcioj — la unua kunsidas en la salono, pridiskutante la problemojn de praktika lingvo-aplikado, la alia — samtempe praktikas la lingvon konatiĝante kun la leningrada laboristaro kaj ĝia vivo.

Lundon. Matene — sekciaj kunsidoj de ateistoj, de fabrik-uzinaj korespondantoj de instruistoj, de radiistoj, ktp., ktp. Komuna fotado de la Kongreso, kino-fotado.

La strukturo de SAT restu tia, kia ĝi estas.

Vespere okazas la antaŭlasta kunsido — la raporto kaj la diskutoj pri rilato inter SAT kaj landaj laborist-esperantistaj organizaĵoj. Sed, vere, la diskutoj ne estas longaj — estas klara la reala forto de SAT kaj ĝia valoro kaj la Kongreso aprobas la raporton de l' Komisiono, elektita dum la kvina Kongreso kaj veninta al la konkludo, ke SAT devas esti laŭ sia strukturo tia, kia ĝi estis ĝis nun.

La Kongreso proksimas al sia fino. Estas pridiskutitaj la tradiciaj proponoj ĉiujaraj, estas akceptita la gvid-rezolucio. La « Internacio » finas la Kongreson. Sed ne forsonis ĝiaj lastaj silaboj — kiam kongresanoj rapidas, ekster la kongresa programo — kvazaŭ eternigi por kelkaj SAT-grupoj la memoron pri la VI-a. SAT-grupo Essena transdonas standardon al SAT-grupo Minska. SAT-grupo el Irkutsk — al tiu de Essen kaj SAT-grupo Krjukov S/D — al Ekzekutivo de SAT.

Tiuj neluksaj standardoj estas la signo pri la granda frata amikeco de diverslandaj SAT-anoj. Kaj la esprimo de tiu frata amikeco kronis la tutan Kongreson.

Vespere, kiam boat-sportistoj de Leningrado, regalis nin per bela veturado dekhora, sur motorboato kaj sur velboatoj, al la maro — ni estis intima proleta familio. Nia « Proletaria Kantaro » havis dum tiu veturado grandan uzon. Dum la tutaj du horoj unu post la alia sonis niaj kantoj super la trankvila mara suprajo, bele kolorita de la sunsubiro.

Ĉe la kajo rapidece ni adiaŭas la samboatanojn kun iu korpremo — ĉu iam ni sukcesos revidi ilin sur la kongresa SAT-boato ? Mi almenaŭ esperas, ke jes !

G. Demidjuk.

(*) Ĉeestantaro — *Red.*



KONGRESA POŜTOFICEJO



Al la proletaj verkistoj esperantistaj !

La Leningrada Kongreso estas granda paŝo antaŭen por nia movado. La demando pri lingvo internacia nun staras pli aktuale ol iam antaŭ la laboristaj organizaĵoj. Pli ol iam estas nun necese, ke ni povu montri al la respondecaj gvidantoj de la laboristaro, ke esperanto taŭgas ne nur por komerco, turismo, filatelio, nudkulturo ktp.. sed ankaŭ por esprimi sciencperfekte ĉiujn batalaspirojn de la proletaro. Tiurilate nia lingvo ne estas ankoraŭ sufiĉe tralaborita : niaj ekonomia kaj filozofia terminaroj estas ankoraŭ iom truhavaj. Ni devas ilin kompletigi per la elementoj jam ekzistantaj en esperanto, sed ĝis nun pro ne-ekzistanta bezono ankoraŭ ne kunmetitaj.

Pro tio pli vigla traduklaboro el konataj, valoraj teoriaj verkoj socialistaj estas treege konsilinda. Tradukante, niaj K-doj trovos multe da esprimoj kreendaj, ĝis nun neuzitaj, ĉar bezono malestis.

La K-doj tradukontoj ne mallaboru, timante ke la eldonejo de SAT ne povos tuj publikigi la tradukojn. Se tuta libro aŭ broŝuro ne estas tuj aperigebla, ekzistas ja Sennaciulo aŭ *Sennacieca Revuo* por presigi dume la plej interesajn kaj plej aktualajn ĉapitrojn au pecojn.

Mi volus atentigi nur pri la jenaj verkoj, kies traduko al mi ŝajnas nepre farenda :

Julian Borchardt: « La ekonomiaj konceptoj fundamentaj laŭ la doktrino de Karl Marx » (germ.)

N. Buĥarin: « Historia materialismo » (ruse.)

F. Engels: « Evoluo de l' socialismo de utopio al scienco » (germ.)

— « Deveno de familio, privata propraĵo kaj ŝtato » (germ.)

R. Hilferding: ĉapitroj el « Financa kapitalo » (germ.)

K. Kaŭtsky: « La historia signifo de Karl Marx » (germ.)

N. Lenin: « Demandoj de politika ekonomio » (ruse.)

Roza Luxemburg: Ĉapitroj 26 (parte), 27, 28, 29, 30, 31 el « Akumuliĝo de l' kapitalo » (germ.)

K. Marx: Enkonduko al « Kritiko de politika ekonomio » (germ.)

— « Valoro, prezo, profito » (angle)

G. Pteĥanov: « Fundamentaj problemoj de l' marksismo ».

J. Walcher: « Ford aŭ Marx ? » (germ.)

Tio estas nur mallonga listo. Sed el ĝi oni povos ĉerpi multe da valoraĵoj por nia movado. Tiuj verkoj ne estas tradukitaj en ĉiujn lingvojn, multaj K-doj ĝojos ilin legi, almenaŭ parte, en esperanto.

Sed por ke du K-doj ne entreprenu la saman tradukon, necesus sin turni al unu K-do scianta pri ĉies tradukintencoj kaj povanta doni la nemalhavendajn konsilojn.

L. Revo.

★

Noto de la Red. — La intenco kaj plano de K-do Revo estas aprobindaj. Interesatoj devas ekinterrilati kun la *Literatura Komisiono,* kiu povos ordigi la aferon.

NIA POŜTO

6326. — Bedaŭrinde ni ne povas uzi vian bone aranĝitan manuskripton, tial ke la enhavo ne interesus tutmonda legantaron.

3935. — Ni gratulas vin, sed ne disponas lokon por konigi faktojn, kies karaktero estas tro persona.

5328. — 1) La kunlaborado al « S-ulo » k. « S. R. » estas tute senpaga — oni eĉ povus diri malpaga ; 2) pri estetiko ne ekzistas firma kriterio ; 3) viaj lingvaj demandoj ne estas sufiĉe klare formulitaj. Bonvolu citi tutan frazon. Fakulo detale respondos. Ni povas tamen jam klarigi al vi, ke la uzo de akuzativo post iuj prepozicioj montras movon. Ekzemple, post la prepozicio « anstataŭ », citita kiel *unukaza* en « Petro » oni povas k. eĉ kelkokaze la klareco postulas uzi akuzativon, kiel klarigas Zamenhof en la respondo *51* de « Lingvaj respondoj ». Ni konsilas, ke vi mendu al nia Adm. tiun nepre necesan verkon, por ĉiu, kiu volas ellerni la lingvon ; 4) Vian artikolon ni uzos, se bezone.

3125. — Ni ne memoras tre precize pri la enhavo de via « kronikaĵo », sed se ni konsilis, ke vi legu : « For la neŭtralismon », tio kredeble signifas, ke vi raportis pri faktoj, kiuj ĉefe interesus neŭtralulojn.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni aur mencias.

Tra U. S. S. R. per Esperanto, de N. V. Nekrasov. Eldono de « La Nova Epoko » (Moskvo). Formato 14 × 11 cm., 40 pĝ. — Prezo : 20 kopekoj.

Ĉi libreto estas plenigita per utilaj informoj, inkluzive : poŝt-telegraf-mon-sistemoj, sciigoj pri USSR., SEU., esperantistejaj adresoj, klimato kaj naturaĵoj de l' diversaj regionoj. eĉ kelka instruo pri rus-lingvo kaj praktika frazaro. La kompilinto pardonpetas pri nekompleteco, ĉar li rapidis por eldoni ĝustatempe por la VI-a; sed nenecese, ĉar evidentiĝas, ke la verketo tre povas utili al esperantistoj, ne scipovantaj la rusan lingvon. Laŭdinde K-do Nekrasov ne preterlasis la okazon por reklami sur la kovertaj paĝoj pri la SAT-eldonaĵoj.

Kongresa Kantareto. Formato 15 × 18. Donaco por la kongresanoj de l' VI-a. Eldono de « La Nova Epoko ».

Por ne-ĉeestintoj de la Kongreso mi diru, ke ĉi kantareto entenas 4 originale-verkitajn kantojn, la novigitan (revoluciigitan !) neŭtralan « Espero »-n, « La Internacio »-n kaj la rusan « Funebra-n Marŝo »-n konatajn de posedantoj de l' SAT-Kantaro.

E. K. L.

Esperanto in Handel und Verkehr, de Robert Kreuz. Eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Formato 22 × 15 cm., 112 pĝ. Kartonita. — Prezo ne-montrita.

La Individualisma Socialismo, de D-ro Axel Robertson Prochowsky. Eldono de Rasa Virina Klubo, Paris. Formato 13 × 10 cm., 15 pĝ. — Prezo ne-montrita.

Gvidfolioj pri Genève, Stettin, Dobŝina, Thiers, Deal kaj Bratislava, riceveblaj senpage de Turisma Servo de U.E.A. ; kaj broŝuro kaj afiŝo pri **Specimen-Foiro de Reichenberg,** 14-20 aŭg. 1926, ankaŭ atingis la Redaktejon.

Ĵus aperis :

ETIKO

de P. KROPOTKIN

240 paĝoj. — Prezo : **1.80** mk. g. inkluzive afranko

ENHAVO

Portreto de l' aŭtoro. — Antaŭparolo de Prof. N. Kabanov. — Ĉapitro I. La moderna bezono konstrui fundamenton de la moralo. — Ĉapitro II. Aperetantaj elementoj de nova etiko. — Ĉapitro III. Morala principo en la naturo. — Ĉapitro IV. Moralaj konceptoj de primitivaj popoloj. — Ĉapitro V. Evoluo de moraldoktrinoj. — L'antikva Grekio. — Ĉapitro VI. Kristanismo. — Mezepoko. — Renesanco.

Aktivuloj ! Atentu !

La 19-an de septembro okazos en Leipzig la inaŭguro de la « Arbeiter Turnund Sportschule » (Laborista Gimnast- kaj Sportlernejo). La solena malfermo speciale impone estas aranĝata. Matene je la 10-a almarŝos el kvin urbpartoj muzikĥoroj po 1.000 tamburistoj, por koncerti komune sur la « Augustus Platz » (ĉefa placo de Leipzig). Tie ili aŭdigos en ĥoro (5.000 p.) la « Internacion » kaj aliajn revoluciajn sportmelodiojn. Poste ili denove dividiĝos en 5 ĥoroj kaj marŝos al la Fichte strato, kie konstruiĝis « nia » *Altlernejo por Fizkulturo*. Multaj miloj da laboristsportuloj alveturos el la tuta lando por ĉeesti la alvenon de salutstafetoj, alportotaj parte de el pli ol 900 km. malproksime, el Francio, Belgio, Latvio, Aŭstrio, Svisio kaj ĉiuj anguloj de Germanio. K-doj, ĉi-momento ankaŭ meritas nian atenton. Malfermiĝas ja ankaŭ por niaj tutmondaj K-doj ĉi-institucio, kie estonte instruistoj el niaj vicoj kaj firme en oficigotaj kuracistoj instruos, edukos kaj kontrolos la estontajn gvidantojn de « nia » sportmovado laŭ « nia sistemo » kaj « niaj idealoj ». Nenie en la mondo, nek ĉe ni, nek ĉe la burĝaj ĝis nun ekzistas sama edukejo. Ejo, en kiu, laŭ komuniko de la gvidonto K-do Benedix (nuntempe ankoraŭ lernanto de esperanto), ankaŭ nia lingvo laŭvole estos instruata al la kursanoj.

K-doj, ni eluzu la okazon ! Sendu salutleterojn kaj simpatiesprimojn, kaj sufiĉe frue por ke ili alvenu en Leipzig ĝis la 19 sept., kaj estu laŭtlegataj ĉe la oficiala soleno. Sed por ke ili havu oficialan karakteron zorgu ke ili estu sendotaj en la nomo de iu ajn lab. sportorganizaĵo.

Kredu, ke via helpo estas tre bezonata.

Adreso : Arbeiter Turn-und Sportschule, Leipzig S. 3. Fichtestr. 36, Germanio.

SAT-ano 2518.

★

Kiuj deziras detalan informon pri la tasko kaj ekiko de la lab. spotlernejo, tiuj skribu al K-do 2518, Meyenburg.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento (*), nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi ;* la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado,* ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura,* senkonfuza kaj sendanĝera.

L.-L. ZAMENHOF.

(*) La « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto. Oni mendu ĝin ĉe nia Administranto.

Le Gérant : L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono : Gobelins 62-71